al vi vojaĝasekuron, ĝi validas ankaŭ por viaj pakaĵoj, ankaŭ ĝi vendeblas ĉi tie.

•••

H: – Vera bonŝanco estis ricevi busbiletojn lastminute, la trajnbileto tien kaj reen kostus multe pli, eĉ sen kuŝlokoj!

A: – Ni antaŭvidas nun sufiĉe longan veturadon, tagan, noktan. Aviadilo estus pli rapida!

H: – Certe, sed tro kostaj la biletoj; se ni povus rezervi lokon jam monatojn pli frue, por iu senluksa flugo! Kial Karlo cedis je veturado al UK? Li proponis, ke ni veturos triope per lia aŭto, komforte, kun bicikloj, kaj ni vizitos urbojn laŭ la vojo.

A: – Li telefonis al mi, ke lia aŭto neatendite paneis. Li esperas, ke la problemo estas bagatela, kaj la aŭto estos riparita ene de du – tri tagoj.

H: – Povas esti, ke jes. Sed se ni atendos lin, eble ni maltrafos la solenan malfermon, kaj eĉ ne nur ĝin...

III. Interesaj renkontiĝoj

Dum la UK, en la Kongresejo, poste en restoracio Herminjo (H), Alinjo (A) kaj Karlo, koramiko de Alinjo (K) babilas.

A: – Ege impona estis la malfermo! Mi vere kortušiĝis, ke mi povis partopreni ĝin.

H: – Jes, kara, ankaŭ mi sentas same! Kaj ĝojige estas renkonti geamikojn, kiujn mi konis ĝis nun nur virtuale! Mi fin-fine povis konatiĝi kun tiuj, kiujn mi konis nur rete, per skajpo, aŭ per la programo Lernu! Mi jam multe atendis renkonti multajn! Plej interese, ke mi imagis ilin ĝuste tiaj, kiaj ili estas.

A: – Herminjo, ĉu tiu ĉi estas la unua fojo, ke vi vidas ilin persone? Mi imagis, ke vi jam estas sperta kongresanino!

H: – Ho, tute ne! Ja mi vere nun la unuan fojon partoprenas la kongreson! Ni iru nun vespermanĝi kun la aliaj, mi vere malsatas jam!

A: – Ankaŭ mi estas manĝema! Mi scivolemas pri la surlokaj specialaĵoj!

•••

H: – Rigardu Alinjo, tien, ĉe la tria tablo de la pordo, maldekstre! Ĉu eble ne via Karlo sidas tie en la kompanio de aliaj kongresanoj?

A: – Ho, vere! Sed kiel tio eblas? Halo Karlooo! Halooo! Venu al nia tablo, estas ankoraŭ loko!

K: – Saluton knabinoj! Mi ĝojas, ke vi sukcesis alveni! Mi havis belan planon veturi ĉi tien aŭte, triope, dumvoje rigardi urbojn, vidindaĵojn... mi bedaŭras, ke tio ne sukcesis pro neatendita paneo de mia aŭtaĉo... Mi ne volis perdi la enpagitan kongreskotizon, kaj certe la okazon partopreni la kongreson,

tiel mi haste aĉetis trajnbileton. Dumvoje mi konatiĝis kun tre ĉarmaj samideanoj... mi veršajne trovos tranokteblon ĉe ili. Ĉu mi prezentu vin al ili?

Taskoj

1. Plenigu (imagitan) aliĝilon, kaj aldonu ankaŭ la sekvajn demandojn, kaj ankaŭ tiujn respondu!

2. Provu prepari aliĝilon al iu (imagita) evento (vi povas uzi ankaŭ la subajn)!

2a Mia alventago (ttmmjj) / Tago de forveturo (ttmmjj)

2b Mi alvenos sola / kun .....

2c Mi rezervos unu- / du- /kvarlitan ĉambron

2ĉ Debetu la sumon el mia UEA-konto / mi ĝiros la monon tra banko al la konto....

2d Mi estas vegetarano / viandomanĝanto

2e Mi partoprenos la sekvajn programojn: urborigardado kun ĉiĉerono / adiaŭa vespero kun balo / šipekskurso / tuttaga ekskurso per aŭtobuso al....

3. Enpaku vian valizon: kion vi kunportus al UK, kiu okazas en lando en la suda hemisfero, apud la maro?

4. Kolektu la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de a) veturado karavane, b) veturado aviadile, c) veturado trajne, ĉ) veturado aŭtobuse, d) veturado propraŭte (kun ruldomo), e) veturado bicikle!

5. Imagu dialogon dum renkontiĝo kun malnova amik(in)o, kun kiu vi ĝis nun korespondadis, retumis, sed kiun vi neniam vidis!

6. Skribu (ret)leteron al via amik(ino pri via (imagita) partopreno en esperantista kongreso! Skribu proksimume 15 liniojn, ne forgesu pri alparolo, enkondukaj demandoj, adiaŭo!

Vortklarigoj

Formularo: papero (aŭ reta spaco) sur kiu estas presita šablono de dokumento, en kiu estas lasita spaco, kiun koncernuloj plenigas per okazaj informoj (nomoj, datoj, monsumoj ktp)

Prelego: Parolado forme simila al lekcio, kiu tamen povas esti adresita al pli vasta aŭ malpli konstanta publiko

Kotizo: Pago de sia parto por komuna elspezo.

Enketi: Metodo esplori pri ia okazaĵo aŭ opinio.

Giĉeto: Fenestreto en pordo, mureto, destinita por interparoli aŭ transdoni ion.

Asekuro: Kontrakto kun kompanio, kiu en okazo de domaĝo aŭ perdo pagu kompensan monon.

Validi: Valori laŭ certaj kondiĉoj pri leĝeco, templimo ktp.

Cedi: Ne kontraŭstari.

Komforto: Ĉio, kio igas la vivadon pli facila, la loĝadon pli oportuna, la hejmon pli ripoziga; ĉio, kio malpliigas penon kaj laciĝon en la ĉiutaga vivo.

Paneo: Subite ne plu funkcii.

Bagatela: Malgrava, malserioza, ne inda je konsidero.

Solena: Pompa kaj gravigata per grandaj ceremonioj.

Impona: Kaŭzanta admiron, surprize granda, brila.

Kortušiĝi: Senti fortajn emociojn; kompati iun.

Reto: Interreto; Skajpo: esperantigita nomo de servilo per reta kontaktado.